



aktuala

36-a ELDONJARO

Esperantista Brusela Grupo, societo centjara neprofitcela fondita je la 10a de Februaro 1907, registrita en la belga ŝtata oficiala ĵurnalo "Belgisch Staatsblad, Moniteur Belge" kun la N°0 419 498 274, honorigita kiel "reĝa" societo ek de la 29a de Majo 1957.

Eldonisto kaj redaktisto: Paulo Branco, 29 rue Froissart 1040 Etterbeek, panb2001 @ gmail.com; **Novaj redaktistoj ek de Januaro 2012:** Samy kaj Laurence Loisse, 95 Tir aux Pigeons 1150 Bruselo, laur1150 @ yahoo.fr ; Prezidanto: Angelos Tsirimokos, 405 av. Louise 1050 Bruselo; Kasisto: Jan Amadori, jan.amadori @ gmail.com; Sekretario: Muriel Petit, 57 rue de Douvres 1070 Anderlecht, nurja @ belcenter.com. Kunvenloko n°2 rue Van Maerlant ĉiumerkrede 18h30-20h metroo MAALBEEK (tie nek poŝtkesto nek telefono).

Abona membriĝo nur por adresoj en Belgio, 10 eŭroj jare, konto BE64 0000 1230 4852, BIC: BPOT BEB1; Eltiro 150 ekzempleroj. In formoj: www.esperantobruselo.org; aktuala.retejo.net; br11.leadhoster.com; ebg.skynetblogs.be; uea.org; paulo.retejo.net; barelo.blogspot.com; esperanto.net; esperanto.be; lernu.net; liberfolio.org; eo.eventeo.net
Vidpunktoj de artikoloj en Aktuala Esperanto ne nepre spegulas opiniojn de ĉefa redaktisto aŭ de EBG- Esperantista Brusela Grupo

ENHAVO

- Paĝo 2 - Kotiztabelo kaj 19a Internacia Esperanto-Semajno
- Paĝo 3 - Poemaro: Camoens, Garcia, Korpilahti, Bronŝtejn, Kalocsay
- Paĝo 7 - Casquero en Hanojo; Oficialaj Lingvoj
- Paĝo 9 - Pentekostistoj, Asembleoj de Dio, Atestantoj de Jehovo
- Paĝo 14 - Esperanta Gramatiko
- Paĝo 16 - Vortaro ilustrita kun desegnaĵoj

PROGRAMO DE LA MERKREDAJ KUNVENOJ

Oktobero 2011

- 5 Semajna Kunveno (1-8.10 Internacia Semajno de Kulturo kaj Turismo en Malgrat de Mar apud Barcelono)
- 12 Bernard-Regis Larue daŭrigas prelegon pri nuna Malto, Gozo kaj Comino
- 19 Semajna Kunveno
- 26 Semajna Kunveno

Novembro 2011

- 2 Semajna Kunveno
- 9 Semajna Kunveno
- 16 Semajna Kunveno
- 23 Bernard-Regis Larue pri Naskiĝejoj de Steloj (kaj 25.1.2012 pri Galaksioj)
- 30 Semajna Kunveno

EBG ĝojas annci al Vi sian **Zamenhofan Feston** okazontan sabate la **17an de Decembro** ekde la 11a horo en la Ĉambro Cardinal Mercier, unua etaĝo de la Biblioteko, 10 Placo Cardinal Mercier, 1090 Jette, tutapude la stacidomo. Detala programo estos anoncita baldaŭ, interalie en retejo < <http://www.esperantobruselo.org/drupalo/eo> >.

Nikolao de Buyl, estrarano de EBG - Esperantista Brusela Grupo

Grupanoj aŭ ne, prelegontoj estas ege bonvenaj, bonvolu sin annci

KOTIZ-TABELO 2012

Nro	Kodo	Kategorio kaj Kotizo	€	Rajtoj
ESPERANTISTA BRUSELA GRUPO				
11	MEM	Membro de EBG	10	Abono al "Aktuala" (organo de EBG)
12	MEM-R	Membro-junulo (ĝis 26-jara)	5	+
13	MEM-S	Membro-pensiulo, senlaborulo	7	partopreno en la vivo de la Grupo
14	FAK	Familia kunloĝanto	2	Partopreno en la vivo de la Grupo
18	DVM	Dumviva membro de EBG	250	Membreco kaj "Aktuala" dum la tuta vivo (25 X MEM kotizo)
BELGAJ REGIONAJ ESPERANTO-ASOCIOJ				
21	APE	"Association pour l'espéranto"	14	Membro+Abono al "Esperanto en Marche" (parte franclingva)
22	FEL	Flandra Esperanto-Ligo (FEL)	25	Membro+Abono al "Horizontaal" (grandparte nederlandlingva)
UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO				
31	SA	Abonanto de "Esperanto"	38	Abono al "Esperanto", monata organo de UEA
32	Kto	Abonanto de "Kontakto"	23	Abono al "Kontakto", junulara revuo de UEA
33	MJ	Membro kun "Jarlibro"	25	Membreco en UEA + "Jarlibro"
34	MA	Membro-abonanto de UEA	61	MJ + SA + Kto (se junulo) + rabato !
35	MG	Membro kun "Gvidlibro"	10	Membreco en UEA + "Gvidlibro" (sen la adresaro de delegitoj)
36	SZ	Membro de Societo Zamenhof	122	Honora rondo de esperantistoj, finance subtenantaj UEA
37	MD	Dumviva Membro de UEA	1525	MA de UEA dum la tuta vivo! (25 X MA kotizo)

Kara membro de EBG, bonvolu pagi tuj 10€ abonkotizon 2012 al konto BE64 0000 1230 4852, BIC : BPOT BEB1

INTERNACIA ESPERANTO-SEMAJNO



Okazis en Malgrat de Mar apud Barcelono, ekde la 1an ĝis la 8an de Oktobro 2012, la 19a Internacia Esperanto-Semajno de Kulturo kaj Turismo. Partoprenis 130 homoj kies preskaŭ 10% estis belgoj, per ordo de aliĝo: Michèle Villers & Hubert de Meyere el Bouffouls, Gwendoline Declerq & Guido Blondeel el Aalst, Liliane & Rita Keteelers el Oostende, Cecile Deprez & Omer Sinnaeve el Bredene, Eduard Kuster & Eddy Raats el Edegem Antverpeno, Diemante & Paulo Branco el Bruselo.

POEMARO:

LA LUZIDOJ DE CAMOENS

101

Ĉar vidas la kastila reĝ' ke vana
estus batal' frontanta tian forton,
timante l' finon de l' popol' hispana
(perdita foje) pli ol propran morton,
li sendas al la reĝo luzitana
l' edzinon karan kaj helpetan vorton;
edzin' ŝi estas de l' sendant' kaj kara
filin' de l' adresata reĝ' najbara.



Statuo de Luis Vaz de Camoens (1525-1580)

102

Maria, la belega, do alvenis
al la palac' de l' patro, brile ora;
la belaj trajtoj pro malĝoj' ĉagrenis,
en la okuloj estis bano plora;
l' anĝelajn harojn ŝi sternitaj tenis
sur ŝultroj kaj sur kol' eburkolora;
kaj al la ĝoja patro, kiu varme
akceptas ŝin, ŝi jenon diras larme:

103

"En kiom da popoloj sin dividas
Afriko tuta, stranga gent' barbara,
tiomajn la maroka reĝo gvidas
por la konker' de Hispanujo kara;
potencon tian kuran ni ne vidas,
de kiam teron banas salo mara.
Kun tia furiozo ili iras,
ke timas la vivul', mortinto miras!

104

La edzo, kiun al mi donis vi,
sub la minaca maŭra spado spita
disponas por defendo de l' patri'

nur pri malgranda forto pormilita.
Se li ne trovos helpon tie ĉi,
je regno kaj je edzo senigita
vi vidos min: vidvino en tristeco,
sen regno, sen feliĉo kaj sen edzo.



Tombejo de Luis Vaz de Camoens (1525-1580) en la Monakejo de la Jeronimoj en Lisbono

105

Do, reĝo, antaŭ kiu timoplena
kaj frosta iĝas de Muluk' torento,
rapide venu kun la help' subtena
al la kastila malfeliĉa gento.
Se estas la akcepto ĝojmiena
Konfirm' de vera patra amosento,
rapidu, ĉar se vi ne tuj vin movos,
neniun, eble, vi por helpi trovos."

106

Maria ŝajnis laŭ l' peteg' timida
Venuso, kiam en dolor' tortura
la patron petis ŝi pri helpo gvida
por sia fil' Eneo, marvetura,
ke falis, pro kompat', l' enmane sida
fulmsago abomena kaj terura,
dum la amanta patro ĉion cedis,
nur bedaŭrante, ke ne pli ŝi pledis.

**Luis Vaz de Camoens (1525-1580),
Kanto 3, 101-106, paĝo 134,
Maria reĝino de Kastilio,
demandas al sia patro, Alfonso IV,
reĝo de Portugalio,
helpi sian edzon Alfonso XI,
en milito kontraŭ la sultano de Maroko.
Leopoldo Knoedt elportugaligis.**

4

TEMPA POEMETO Meditoj de Finjaro

Kaj ne permesas esti prenita! ;
haste foriras l' maljuna jaro.
La tagoj estas kiel brutaro
falante al l'maro infinita.

Kaj ne permesas esti prenita!

Rigardu kiel falas la horoj,
puŝitaj de la tempo senfina;
estas kiel la larmoj, Regina,
de nehaltigeblaj fluaj ploroj.

Rigardu kiel falas la horoj!

Jaroj falante al la haoso;
tagoj kiuj en l' tempo mortiĝas;
dum, la buntaj floroj balanciĝas,
pro l' suno, malaperas la roso.

Jaroj falante al la haoso!

Jaroj kiuj pasas tro-rapido
irante per flugo, kiel sagoj,
lasante steleojn de dattagoj,
sen plorlarmoj, sen ĝojo, sen rido. . .

Jaroj kiuj pasas tro-rapido!

Alberto Garcia Orive, 10.01.2011

KANTO DE MEZFINNLANDO

Pinoarbaroj kaj bordsalikaroj,
ĉirkaŭ valrandoj betula densej'.
Kiel fascino pasado laŭ padoj
inter flormonto kaj fragokreskej'.
Verda profundo de boskaj folioj,
brila okulo de rokanda lag',
alto de montaj majestaj abioj.
Hejmo benata en ĉiu tag'!

Laŭdas la filo de sia popolo
hejmregionon en sia patri'.
Lin ĝi edukis, kaj do lia volo
estas dediĉi vivverkon al ĝi;
Tie ekkreskis popola pragento,
tie aperis amika fidel'.

Tien revenas vagul' kun amsento
al la hejmlanda eterna bel'.

Martti Korpilahti (1886-1936), Esperantolehti 2/2010 Aprilo

ROTTERDAMO

Ĉu oni povas fari ankaŭ tion?
Vivantan urbon bati per la bomboj?
La domojn homloĝantajn igi tomboj
flamantaj? Jes. Ĉu la milito-dion

vi do ne konas? Ĉu la tragedion
hispanan vi forgesis? Ties ombroj
ĵetiĝas sur la mondon. La kolomboj
de l' murdo tie lernis la metion.

Guernica, urbo de horora famo,
mesaĝas al martira Rotterdamo:
"Mi vidis, kaj suferis ĉi sovaĝon!

Ne distretita en la frua ĝermo,
nutrita eĉ eskapis ree kaĝon
la monstro de detruo kaj ekstermo."
Kálmán Kalócsay (1892-1976),
Pri bombado de Rotterdamo dum Dua Mondmilito

TALINO MIRINDA URBO

Tajlita pere de mara grifelo
kaj cizelita per pluvo kaj vento,
ne ekzistas sube la firmamento,
nenia alia gemo-juvelo.

Tredita en hela safir-ĉielo
kun rubenoj, marŝaŭmo kaj arĝento,
-per talinanoj de granda talento-,
ne brilas kiel vi, alia stelo.

De la Balta Maro, perlo platena;
fajra rubeno sub suna radio;
monteto de arĝentkupoloj plena;

vi, la plej granda miraklo de Dio
estas! Jes; vi, Talino suverena,
diademo-krono de Estonio.

Alberto Garcia Orive,
dediĉita al geamikoj Diemante kaj Paulo,
dum vizito al Talino, Augusto 2011.

SOPIRANTE AL VI

Kiu kiel vi nutras l' amon mian?;
Aj ! , kiu kiel vi pri mi sopiras? .
Same al la suno kiu deziras
enmeti en la nokton la radian

brila-lumon; mi, en la animon vian
volas flugi; kaj tien mi eniras,
ĉar en via interno mi akiras
la emocio-amon harmonian.

Kiu kiel vi al mia ekzisto
donas vivon, kiu nur por vi estas
konceptita? Kiu al mia tristo

donas ĝojon? Mi, interne vin nestas,
kaj estas mia plej ega insisto
esti ĉiam kun vi kie vi restas.
Alberto Garcia Orive, 2.2.2011, Bilbao

SONETO

La juneco estas kiel torento
fluante rapide, sen kordoloro,
ĝis kie poste estos nur memoro
perdita en la nigra firmamento.

La juneco estas kiel la vento;
kiel fumado, aŭ kiel vaporo;
kiuj malaperas, inter soporo,
apenaŭa ene unu momento.

Mia juneco, Pegaso senbrida,
haste flugis tra la nedaŭra tempo,
serĉante en la mistero-solida

de Krono, la realon de l' ostempo...
sed l' estonteco foriras rapide:
tuj alvenas fariĝante istempo.

Alberto Garcia Orive, 2.5.2011, Bilbao

SONETO

Mi nur havis, kiam mi estis sola,
la solecon de la tempo-malpleno
-ĉielo sen steloj, pekoj sen beno-
vaganta pilgrimo sen konsola,

paŝante padojn kiuj en mola
grundo perdiĝas; kiel helmeteno
en ombroj; horoj, sen horloĝsubteno;
luno sen nokto; buŝo sen parola.

Kiam mi estis sola en l' silento
de la soleco, de l' tempo senfina:
sen amo, sen imago, kaj , sen sento;

falante al la tragiko rutina,
mi troviĝas en reviva momento
kiam tuj mi ekkonis vin, Regina.
Alberto Garcia Orive, 2011, Bilbao

SONETO

Sinpreparo por morto - maldecas.
Sinpreparo por vivi eterne
Sobraj homoj nur ride aprecas,
Sin fortunaj kun moko.En ver' , ne

Brilos eĉ nia Suno senfine,
nek florados plej puncas papavoj,
kiuj estas sendube por mi ne
pli ol sango de patroj kaj avoj.

Ja nemulte da tempo en tuto
restis ekde la ĵusa minuto
ĝis foriro, forflug', malapero,

ĝis refoja papava reveno.
Vivoĝoj' multe pli ol ĉagreno
Vokas min al papero.
Mikaelo Bronŝtejn, 4.9.2004, Tiĥvin, Rusio

SILENTE, NIGRE...

Silente nigre kuŝas mia sento,
Kiel la ondo de la nokta mar',
Se kaŝis sin la luno kaj stelar',
Kaj sternis sin en svena dorm' la vento.

Sveninta sento, kuŝu en silento.
La bril' de pensoj kaj la bril' de far'
Jam vane rompus tra la nuba bar',
Jam vane vipus vente vin turmento:

Ĉar ŝi, la ŝip', por kiu vin sopir'
Perforte pelis al freneza peno,
Neatingebla estas por dezir',

Kuŝante jam feliĉe en haveno,
Ve, en la brakoj de alia vir'
Kun senkonscie arda ĉirkaŭpreno.
Kálmán Kalocsay (1892-1976)

SE EKBRULUS...

En mia trista, sopirbrula kor'
Ardante fluas mia amsufero.
Metal' rigida el fluanta fero:
Molĝoja vers' fandiĝas el dolor'.

jen kanto, kvazaŭ sonorilsonor'
Kiu funebro muĝas tra l' aero,
jen kant' sovaĝa, kant' de malespero:
Nenie bril', nenie, helkolor'.

Ho, se ekbrulus en via amo flamo
Kaj koron de l' eterne-vin-amant'
Karesus vi per via vera amo:

Ho, kara, tiam estus mia kant'
Por vi fajrere brila kapornamo
El ĝoja or', kun pompa diamant'.
Kálmán Kalocsay (1892-1976)

EL SEKRETAJ SONETOJ, 1932

Brakume vi en mia sino sidis,
la dolĉajn vangojn kovris am-purpur',
kaj mi karesis vin ĉe l' svelta krur';
sed mia am' pli supren ekrapidis,

kaj glitis, glitis, vane ĝin mi bridis,
sur la blanksilka haŭto de l' femur',
kaj vin unue tuŝis ĉe l' velur'
humide arda, kiun ĝi avidis.

Vi rigidiĝis, kaj ekĝemis mole,
kaj spasme premis min al vi kor',
kaj poste vi eklulis vin senvole,

ĝis, sub la fingro-lud', el am-amfor'
sur miajn fingrojn gutis preskaŭ bole
varmega suk': Oleo de Amor'.

Kálmán Kalocsay (1892-1976)

EL SEKRETAJ SONETOJ, 1932

Dum inter viajn du femurojn, Kara,
premiĝas mia kap' kun arda bor',
kaj mia lango vibras kun fervor'
en via servo plej familiara,

min ravas dolĉa, milde fiŝ-ovara
parfumo, kaj el via am-amfor'
nektaro varma verŝas sin jam for
kun freŝa gusto de la salo mara.

Ho praodor', pragusto! Ho, nebula
memoro senkonscia, kiam nin
balancis mole la pra-marol'.

de l' fet-fluid' en korpo de l' patrin'
Ho, min transpremi tra la vojo brula,
sub via koro luli min sen fin'!

Kálmán Kalocsay (1892-1976)

EL SEKRETAJ SONETOJ, 1932

Benata nokto! Arda nokto nupta!
Komforta kuŝo en duobla sol'!
Senĝena, longa, longa am-peto!,
ĝis spino-vibro, ĝemo, kri' abrupta!

Tordiĝo arda en barakt' volupta,
fandiĝo en ekstaza karambol'!
En vin, en vin, kaj el vi al la tol'
inunde fluis mia sem' erupta!

Niaj animoj ardis, korpoj brulis,
kaj vane ŝprucis la estinga flu',
ĉar niaj korpoj ĉiam pli postulis,

pelante nin al ĉiam nova glu'.
Kiom da fojoj? Kiu ja kalkulis?
Du, tri, kvin, ses, ok, dek kaj tiel plu...

Kálmán Kalocsay (1892-1976)

CASQUERO EN HANOJO

Pri printempa renkontiĝo en Hanojo, Vietnamujo, preparante la Universalan Kongreson de 2012. La 9a de aprilo 2011 okazis en Hanojo la "Printempa Renkontiĝo". Tio okazis kiel ĉiujare, kune kun la Omaĝo al la Memoro de Ludoviko Zamenhof, kun la ĉeesto de granda kvanto da vietnamaj geesperantistoj. Unue la ibera esperantisto Augusto Casquero de la Cruz parolis pri Ludoviko Zamenhof kaj pri la naskiĝo de Esperanto, kun prezentado de fotoj. Georgo Handzlik kantis kanton "Mi volas danki vin" kaj la himnon de Esperanto. Li gratulis la vietnaman movadon pro la bonega kaj entuziasma laboro por Esperanto, por la internacia amikeco, kaj pro la preparado de la UK de 2012, kiu okazos en Hanojo. Tuj poste diversaj aktivuloj parolis pri siaj aktivuloj por Esperanto en Hanojo, inter ili la junaj kaj talentaj esperantistinoj Flama Floro, Belinda (prezidanto de VEJA), Raquel, kaj reprezentanto de la Esperanta Universitata Asocio, kiu efike agas en la disvastigado de internacia lingvo en universitata medio. Fine maljuna aktivulo parolis tre interese pri la "Knabeco de Ludoviko Zamenhof", kun prezentado de bildoj. Post tiu inaŭguro komenciĝis la Printempa Renkontiĝo, kun prezentado de aktivuloj ĉe la universitato, de preparlaboroj de la UK, far samideano Verda Rivero, kaj pri vietnama movado. La universitataj gelernantoj bele kaj amuze instruis kaj kantis amuzajn kantojn en Esperanto kune kun la ĉeestantoj. Ankaŭ amuza konkurseto okazis, kun demandoj pri Esperanto kaj disdonado de belaj premioj. Por finigi la eventon, ĉiuj

7
amikece kaj abunde kunmanĝis vietnamajn manĝaĵojn.



La manĝaĵoj kaj trinkaĵoj estis afable kunportitaj de la ĉeestantoj. Kaj kompreneble la komuna fotado ne mankis. Vere interesa, lerniga, tiu aranĝo, kun la ĉeesto de multaj veteranaj esperantistoj kaj de multaj novaj junaj gelernantoj, kiuj estas pretaj bonege organizi la UK-n venontjare. **Augusto Casquero de la Cruz**

PLI KAJ PLI OFICIALAJ LINGVOJ

En Finnlando estas du naciaj lingvoj, la finna kaj la sveda. Tiel estis ĉiam dum la ekzisto de memstara ŝtato de Finnlando. Jam en la leĝoj faritaj tuj post memstariĝo jare 1917 videblas traktato de tiuj du lingvoj en ŝtata nivelo egale kaj en regiona nivelo per divido laŭ la proporcioj de parolantoj de la du lingvoj - tio estas, Finnlando konsistas el finnlingvaj, svedlingvaj kaj dulingvaj regionoj. En leĝoj estas devigoj por la oficialuloj scipovi ambaŭ naciajn lingvojn laŭbezone. Tiom simpla la lingva situacio en Finnlando ja ne estas. Homoj parolas ankaŭ multajn aliajn lingvojn, kaj

8
dum la lastaj jardekoj kreskis iom post iom postuloj difini oficialecon ankaŭ por kelkaj aliaj lingvoj kaj organizi servojn per ili. Unua por atingi tion estis la samea lingvo - aŭ pli ĝuste la sameaj lingvoj plurale, ja ekzistas naŭ apartaj formoj de la samea, el kiuj tri estas parolataj en Finnlando, sed por simpleco kutime konvenas paroli nur pri la samea lingvo. En jaro 1991 akceptiĝis leĝo, kiu difinis por la samea lingvo en multaj ŝtataj kaj municipaj oficoj en la norda parto de la lando similan staton, kiu estas por la du naciaj lingvoj tutlande.

Nova konstitucio farita jare 1999 ankoraŭ difinas la naciajn lingvojn esti la finna kaj la sveda, sed post tio mencias la sameojn kaj ciganojn, "kaj aliajn grupojn" sen plia difino, havi rajton vivteni kaj disvolvi sian lingvon kaj kulturon, kaj fine ankaŭ la gestolingvon por aŭdhandikapuloj. Tio tute ne signifas, ke ĉiuj tiuj lingvoj havus same fortan pozicion kiel la du naciaj lingvoj, sed ke uzo kaj instruado de tiuj lingvoj povas ricevi ian ŝtatan subvencion, kaj ekzemple lernejoj lecionoj povas okazi en ili. Post tio oni ankoraŭ nomumis kelkajn aliajn lingvojn el oficialan staton.

En la nomumo de oficialaj lingvoj oni ne volis elekti simple tiujn lingvojn, kiuj havas la plej grandajn kvantojn da parolantoj. La plej grandaj nun ja estas la rusa kun pli ol 40 000 parolantoj en Finnlando, la estona kun 20 000 kaj la somala kaj la angla kun almenaŭ 10 000. Ĉiuj oficialaj lingvoj estas malpli grandaj ol tiuj, sed oni volis per oficialigo subteni lingvojn, kiuj havas longan tradicion en Finnlando kaj ŝajne ankaŭ lingvoj,

kiuj ne estas oficialaj - almenaŭ ne majoritataj - en iu alia lando. Specialan valoron havas la samea, kiun oni konsideras indiĝena lingvo - laŭ ofta diro la sola indiĝena lingvo en la Eŭropa Unio.

La 26an de novembro 2009, la registaro de Finnlando decidis pri unu plia oficiala lingvo, la karela. Pri la decido oni povas miri ĉefe, kial maljam nun, ĉar estas kaj pli malgrandaj kaj pli fremdaj lingvogrupoj, kiuj jam antaŭ ricevis similan oficialeco: la tatara kaj la jida estas ambaŭ parolataj de maksimume mil homoj en Finnlando, kaj venas el tute fremda kultura sfero. Ankaŭ la samea ne estas granda, nur malpli ol dumil parolantoj en Finnlando. La karelan oni kalkulas paroli almenaŭ 5000 homoj kaj kompreni 20 000 homoj en Finnlando. Krom tio, ĝi ja estas lingvistike la plej proksima parenca lingvo de la finna - se oni ne konsideras la formon de la finna parolata en Nord-Svedio esti aparta lingvo, la t.n. meänkieli ("nia lingvo"), kiel oni iam diras pri ĝi, sed esence meänkieli ja estas dialekto de la finna.

Nun oni ofte bedaŭras kaj hontas pri la iama subprema traktado de la minoritataj lingvoj (legu pri ĝi ekzemple "La sorto de la sameoj" en EF 3/2009), sed indas ankaŭ kompreni, ke la socio ne ĉiam estis tiom riĉa pri rimedoj por funkcii en multaj lingvoj. Ĉiam kostas monon organizi ekzemple lernejajn servojn en plia lingvo, t.e. eduki instruistojn kaj presi lernolibrojn en plia lingvo, kaj ankaŭ dungi la instruistojn por labori en la minoritatlingva grupo de lernejoj, kiu povas esti malefika grupo en tiu senco, ke ĝi okupas laboron de

unu instruisto por tre malgranda grupo da lernejoj. Mi tute bone komprenas, ke almenaŭ Finnlando ĝis la 1970-aj jaroj havis plenan strebon por realigi lernejojn por ĉiuj almenaŭ en iu lingvo, kaj oni ne povas retrorigarde honti, se tio ne tuj eblis por etaj lingvoj kiel la samea.

Per miksitaj pensoj oni povas tamen rigardi la evoluon de la lernejoj en lastaj tempoj. La socio ne havas monajn rimedojn sen limoj, kaj nun la ekonomia krizo efikas draste. Samtempe kiam oni parolas pri novaj kaj pliaj bezonoj por edukado, en la praktika nivelo la municipoj devas tamen ŝpari pri kostoj, ekzemple pri salajroj de instruistoj. Rezultigas maldungoj de instruistoj kaj la lernejoj devas edukiĝi en pli grandaj grupoj, kio nepre minacas kvaliton de la edukado. Apenaŭ oni volas reiri al la eksa Finnlando de nur du oficialaj lingvoj, sed indas demandi, ĉu oni komencos konsideri la multajn oficialajn minoritatajn lingvojn troa ŝarĝo por la sistemo kaj komencos reiri al malpli bunta sistemo.

Mi ne estas enorma amiko de la koncepto de lingva bunteco en tiu senco, ke mi pensus, ke ju pli da diversaj lingvoj, des pli bona mondo. Mi pensas, ke lingvaj baroj estas reala malhelpo al homa interkompreno, kaj mi pensas, ke la mondo povus vere esti pli facila, se ĝin regus nur kelkaj lingvoj, aŭ en ekstrema kazo nur unu lingvo. Kaj Finnlando povus esti pli facila lando, se ĝin regus nur du lingvoj, kaj ĉiu loĝanto apartenus al aŭ la finna aŭ la sveda grupo, devus nur lerni la alian nacian lingvon en lernejo - kaj krome internacian

lingvon por internaciaj rilatoj - kaj tio estus ĉio.

Tamen mi ne vidas, ke la mondo estus survoje al tia stato, kvankam lingvoj en nia erao mortas. Fakte estas, ke lingvoj en la mondo abundas, nune kaj estonte. La reala defio en traktado de la minoritataj lingvoj estas, ke individuoj devus havi justajn vivkondiĉojn sendepende de la denaska lingva komunumo. Ne lingvoj devas esti subjektoj de justeco, sed individuoj devas. Homo, kiu naskiĝas en iun lingvokomunumon kaj kreskas en ĝi, havos malfacilaĵojn en sia vivo, se ne eblas realigi la vivon kaj ambiciojn per la sama lingvo. Tiam malfacilaĵoj mi ne volus kaŭzi al iu ajn homo, se eblas ĝin eviti. Tial ni havu edukon ankaŭ en minoritataj lingvoj, eĉ ĝis la plej altaj universitataj niveloj, se eblas. Ankoraŭ ni estas malproksime de universitatoj funkciantaj en lingvoj kiel la samea aŭ ka karela, sed ni ne aŭtomate pensu, ke tio neniam eblas.

Ne estas tre longa tempo de tio, ke ankoraŭ mankis al ni universitatoj en la finna lingvo. En la 19a jarcento multaj edukituloj en Finnlando pensis, ke la finna lingvo estas tute tro subkvalita lingvo por esprimi alte evoluintajn personojn. Ekde la 1920aj jaroj ni fine sukcesis organizi en la universitatoj ankaŭ finnlingvan edukadon anstataŭ nur svedlingvan.

Mikko Mäkitalo, Esperantolehti, decembro 6/2009

PRI PROTESTANTISMO (daŭrigo) PENTEKOSTISMO

Pentekostismo aŭ Pentekosta Kristanismo estas kristana movado, kiu speciale emfazas la donacojn de la Sankta Spirito. Ĝi ekestis komence de la 20-a jarcento kiel aparta branĉo de

la protestantismo. Post jarcento de rapida kresko tiu ĉi movado laŭ takso ampleksas pli ol 200 milionojn da homoj. La plej granda pentekostisma konfesio estas la Asembleoj de Dio.



La Asembleoj de Dio estas la plej granda konfesio de la Pentekosta Kristanismo. Ĝi estis fondita en 1914 ĉe Hot Springs (Arkansas). En 2004 ĝi havis dismonde 15 milionojn da anoj kaj 236 022 preĝejojn. Ĝia plej granda nacia branĉo estas la brazila asemblearo, kun 3,5-miliona kredantaro. En Usono ĝi havas 12 100 preĝejojn.


ATESTANTOJ DE JEHOVO

La Kristana Kongregacio de Atestantoj de Jehovo aŭ simple Atestantoj de Jehovo estas restaŭrista, miljarisma kristana kongregacio. La organizo raportas tutmondan anaron de pli ol 7 milionoj da atestantoj implikitaj en la evangeliado. Ili raportas kongresaliĝon de pli ol 12 milionoj. Kaj ĉiujaran partoprenon en la Memorado de la Morto de Kristo havas pli ol 18 milionoj da homoj en la tuta mondo. Ili estas estritaj de la Reganta Korpo de la Atestantoj de Jehovo kiu ekzercas aŭtoritaton sur ĉiuj doktrinaj aferoj. Atestantoj bazas siajn kredojn sur la Biblio, kaj

preferas sian propran laŭvortan, konservativan tradukon, la Traduko de la Nova Mondo de la Sanktaj Skriboj. Ilia ĉefa instruo estas la neevitebla baldaŭa detruo de ĉi mondo per la Armagedono kaj la establiĝo de la Regno de Jehovo sur la tero kiel nura solvo por la problemoj de la tuta homaro. La grupo naskiĝis el la *Movado de studentoj de la Biblio*, fondita en la malfrua 19-a jarcento de Charles Taze Russell, sub la nomo *Zion's Watch Tower Bible and Tract Society*. La nomo estis prenita de Jesaja 43:10-12, adoptita en la jaro 1931. Post skismo en la movado, la filio kiu konservis kontrolon de la socio entreprenis signifajn organizajn ŝanĝojn, alportante ĝian aŭtoritato-strukturon kaj metodojn de evangeliismo sub centralizita kontrolo. La atestantoj de Jehovo estas tre konataj pro la pord-al-porda predikado, distribuado de literaturo kiel ekzemple la revuoj *La Gardoturo* kaj *Vekiĝu!*, kaj pro la rifuzo je militservo kaj sangotransfuzoj eĉ en vivminacaj situacioj. Ili instruas ke la uzo de la nomo *Jehovo* estas pli adorinda kaj menciinda ol simple "Dio", "Sinjoro" aŭ "Eternulo". Ili malakceptas la Triunuon, senmortecon de la animo, kaj purgatorion, kiuj por ili estas nebibliaj doktrinoj. Atestantoj de Jehovo ne celebras festojn kiel ekzemple Kristnaskon, Paskon aŭ naskiĝtagojn pro ties paganaj originoj. La anoj ofte nomas sian doktrinaron kiel "la Vero", kaj diras ke ili troviĝas "en la Vero". La atestantoj de Jehovo rigardas laikan socion kiel lokon de morala poluado sub la influo de Satano, kaj limigas sian socian interagadon kun ne-atestantoj.

Ekzistas almenaŭ du libroj de la Atestantoj de Jehovo en Esperanto: *Kie estas la mortintoj?: La respondo de la Biblio* (Where are the dead?) kaj *Milionoj, kiuj nun vivas, neniam mortos* (tradukita en 1922). Ambaŭ librojn verkis Joseph Franklin Rutherford. La doktrinoj de la atestantoj de Jehovo estas establitaj de la estraro, kio supozigas respondecon pri interpretado kaj uzado de la Skriboj fare de la Reganta Korpo de la Atestantoj de Jehovo. Antaŭ la nova reĝimo de la estraro en 1976, la doktrinaj aferoj estis deciditaj de la ĝenerala direktoro de la Societo Gardoturo. La Gardoturo-publikaĵoj asertas ke doktrinaj ŝanĝiĝoj kaj ties rafinadoj rezultiĝas el procezo de progresema revelacio, per kiu Dio iom post iom rivelas sian volon kaj intencojn. Laŭ la Societo Gardoturo ĝi ankaŭ alvenas al konkludoj pri doktrinoj post la aplikado de la racio kaj profunda biblia esplorado. La literaturo de la Societo Gardoturo petas konsilojn de la sankta spirito kaj direkton de Jesuo Kristo kaj anĝeloj. Tamen, la estraro faras neniun aserton de neeraripovo aŭ dia inspiro. La tuta protestanta kanono de la Sanktaj Skriboj estas akceptita kiel die inspirita, neerara vorto de Dio. La atestantoj akceptas la Biblion kiel science kaj historie precizaj kaj fidindaj kaj interpretas la plimulton de ĝi laŭlitere, sed ankaŭ akceptante ke ĝi estas riĉa je simboleco. Ili pensas ke la Biblio estas la fonto de vero kaj la bazo por ĉiuj iliaj kredoj. La etnografia studo de sociologo Andrew Holden de la religio konkludis ke por ordinara kredantoj deklaroj de la estraro, per la Gardoturo-publikaĵoj, multe pli pezas ol la Biblio mem. La

gvidado de la atestantoj de Jehovo postulas esti la sola videbla kanalo de Jehovo kaj asertas ke la Biblio ne povas esti komprenata sen rilatado kun la Gardoturo-organizo.



Charles Taze Russell (1852-1916), kreis la grupon antaŭe konata kiel "Studentoj de la Biblio". Ĉefa instruado de la atestantoj de Jehovo estas ke la nuna mondepoko, aŭ "sistemo de aĝoj", eniris en la "lastajn tagojn" en la jaro 1914 kaj alfrontas baldaŭan detruon per la interveno de Jehovo kaj Jesuo Kristo, kondukante al savo por tiuj kiuj adoras Dion en la vero. Tiu juĝo komenciĝos per la detruo de Unuiĝintaj Nacioj kaj ĉiuj religioj konsideritaj kiel malveraj kaj demonaj, identigitaj kiel "Babelo la Granda", aŭ la "putino", de Revelacio 17. Tiu evoluo markos la komencon de la Granda Sufero. Satano poste atakos la atestantojn de Jehovo, ago kiu instigos Dion por komenci la

militon de Armagedono, dum kiu ĉiuj reĝimoj kaj ĉiuj homoj ne konsideritaj kiel "ŝafidoj de Kristo" estos por ĉiam detruitaj. Post la batalo de Armagedono, Dio venigos sian ĉielan regnon sur la teron, kiu estos transformita en paradizon simile al la Edena ĝardeno. Post la Armagedono, la plejparto de tiuj kiuj mortis antaŭ la interveno de Dio iom post iom estos revivigitaj por la "tago de juĝo" kiu daŭros jarmilon laŭ Revelacio 20. Tiu juĝo estos bazita sur iliaj agoj post la resurekto, ne sur pasintaj faritaĵoj. Ĉe la fino de la miljara juĝo Satano estos alportita reen por misinformi la perfektan homaron. La fina rezulto estos detala ekzamenado de la homaro kiam ĝi estos fine glorigita. Tiam Kristo redonos ĉian aŭtoritaton al Jehovo.

La publikaĵoj de la Societo Gardoturo instruas ke Jesuo Kristo revenis nevideble kaj komencis regi en la ĉielo kiel reĝo en oktobro 1914. La konsekvenco de tio estis la forpelo de Satano de ĉielo sur la teron kaj pro tio li alportis periodon de "veo" al la homaro, kiel estis profetite en Revelacio 12. Ili asertas ke la greka vorto *parousia* (tradukita kiel "reveno" de Kristo) estu pli precize komprenata kiel "ĉeesto" kaj ke lia reveno estos perceptita per serio de "signoj". Tiel tiu Dua Aperio estus nevidebla ĉeesto, kiu daŭros pli longan tempon.

Renkontiĝoj por adorado kaj studado estas aranĝitaj ĉe la Regnohaloj kiuj estas la "preĝejo" de la organizo, kie ne troviĝas religiaj bildoj. La atestantoj apartenas al komunumoj organizitaj laŭ teritorioj kie ili loĝas kaj tie ili ĉeestas semajnajn diservojn konataj nur kiel "renkontiĝoj" planitaj

de la plejaĝulo de la komunumo. La renkontiĝoj estas plejparte dediĉitaj al la studado de la Biblio kaj literaturo de la Societo Gardoturo. La formo kaj enhavo de la renkontiĝoj estas establitaj de la ĉefsidejo en Brooklyn, kio signifas ke ĝia enhavo en iu ajn semajno estas la sama en la tuta mondo. La anoj de la komunumo renkontiĝas por du sesioj ĉiun semajnon konsistantaj el kvin malsamaj sesioj kiuj povas daŭri tri horojn kaj duono, kaj dum la semajnfino ili renkontiĝas dufoje. Renkontiĝoj estas malfermitaj kaj fermitaj, kun kantoj kaj mallongaj preĝoj ekde la platformo. Ĉiujare, atestantoj de kelkaj komunumoj kiuj formas "cirkvitojn" renkontiĝas por unutaga kunveno kaj dutaga asembleo, kutime ĉe luitaj stadionoj aŭ aŭditorioj. Ilia plej grava kaj solena okazaĵo estas la celebrado de la "Memorado de la Morto de Kristo", kiu okazas samtage kiel la juda Pasko. La atestantoj de Jehovo estas eble tutmonde konataj pro la obstino kaj sindediĉo disvastigi la religion kaj ties instruojn, ĉefe per predikado domon post domo. Ili faras tion laŭ la biblia ordono de Jesuo kiu instrukiis kaj donis la ekzemplon por predikado. Malfermaj hejmaj biblio-studoj estas ofertitaj al homoj kiuj montras intereson pri ilia kredo, kiun ili prezentas per la helpo de multaj literaturaĵoj, kiel ekzemple La Gardoturo kaj Vekiĝu!. La literaturo estas publikigita en multaj lingvoj kun larĝa gamo da libroj, revuoj kaj aliaj publikaĵoj, kun malgranda selektado havebla en pli ol 500 lingvoj. La atestantoj havas la devon dediĉi tiom da tempo kiel eble por la predikado kaj proselitismo kaj ili devas liveri ĉiumonatan raporton al la komunumestro. La baptitaj membroj

kiuj ne prezentas tiun raporton ĉiumonate estas konataj kiel "neregulaj" kaj ili ricevas la konsilon de la komunumestroj por ekprediki. Tiuj kiuj ne prezentas ĝin dum ses sinsekvaj monatoj estas konsiderataj kiel "neaktivaj". Atestantoj de Jehovo povas rajte trinki alkoholaĵojn sed modere. Ilia opinio pri moralo reflektas konservativajn kristanajn valorojn. Ĉiuj seksaj rilatoj ekster la geedziĝo estas kialoj por la forpelo se la juĝato ne pentas. Abortado estas konsiderata kiel murdo. Modesteco pri vestmaniero kaj persona higieno estas ofte substrekitaj. Hazardludoj, ebriiĝo, kontraŭleĝaj medikamentoj, kaj fumado estas malpermesataj, sed modera trinkado de alkoholaĵoj estas permesata.

La familia strukturo estas patriarka. La edzo estas konsiderita kiel la fina aŭtoritato ĉe la familiaj decidoj, sed estas instigata por ke li petu opiniojn de sia edzino, same kiel tiuj de la gefiloj. Geedziĝoj estas postulataj monogamaj. Divorcado estas nur akceptata se okazas malfideleco; tia divorco estas konsiderata kiel "biblia divorco". Se la divorco estas atingata pro alia kialo, nova geedziĝo estas konsiderata kiel malfideleco dum la antaŭa edz(in)o daŭre estas vivanta kaj ne havis alian seksrilaton. Ekstrema fizika misuzo, konscia ne-subteno de la familio, estas tio kion la religio nomas "absoluta endanĝerigo de la spiriteco" kaj estas kialoj por laŭleĝa apartigo de la komunumo.

Formala disciplino estas administrata de la komunumestroj (konataj kiel "plejaĝuloj"). Kiam okazas akuzo de tio kion ili nomas "grava peko" estas vokita la baptita membro, jura komisiono estas formita por determini la kulpecon, administrati helpon kaj eventuale uzi disciplinon. Forpelo,

formo de evitado, estas la plej akra disciplinaĵo administrata en la komunumo. Kontakto kun forpelitaj individuoj estas limigita al familianoj kiu loĝas en la sama hejmo, kaj kun plejaĝuloj kiuj ĉiujare invitas forpelitojn por peti la reakcepton. Formalaj komerca-negocoj povas daŭri se kontrakte aŭ finance ili estis establitaj antaŭ la forpelo kaj estas devigaj. Per evitado de socia kaj spirita interagado kun forpelitoj, la atestantoj restas liberaj kaj malproksimaj de ajna nemorala influo kaj deliktuloj povas esti hontigitaj per pentado, sed la minaco je evitado ankaŭ helpas malinstigi aliajn membrojn je disident-konduito. Evitado ankaŭ estas uzata por membroj kiuj libervole forlasas la organizon kaj formale ne plu rilatas al ĝi. La reakceptado formale okazas sub jura komisiono de baptitaj atestantoj kiu analizas la konduton de la pentito. La riproĉita persono provizore perdas privilegiojn, sed ne suferas limigon de socia aŭ spirita kuneco. La marko estas aplikata se baptita ano insistas je procedo rigardita kiel malobservo de bibliaj principoj sed ne "grava peko". La atestantoj de Jehovo oficiale malaprobas la transfuzojn de sango kaj kelkaj el ĝiaj frakciitaj komponentoj. Laŭ ili la sangotransfuzo estas malobservo de la leĝo de Dio bazita sur la interpreto de Agoj de la Apostoloj 15:28-29 kaj aliaj skriboj. Ekde 1961 la akcepto de sangotransfuzo estis kialo por la forpelo de la membroj el la organizo. La literaturo de la Societo Gardoturo instruas la membrojn rifuzi transfuzojn en ĉiuj kazoj eĉ se risko de morto. La atestantoj de Jehovo akceptas alternativaĵojn sen sango, kaj aliajn vivsavigajn iniciatojn anstataŭ sangotransfuzoj. [Laŭ Vikipedio](#)

ESPERANTA GRAMATIKO

Konciza klarigo pri la uzado de kelkaj prepozicioj: Prepozicio estas gramatika vorto kiu identigas la rilaton inter iu komplemento kaj la komplementita vorto (komplementita vorto kiu povas esti substantivo, verbo, adjektivo aŭ adverbo). La prepozicio ludas kompareblan rolon al la fleksitaj formoj aŭ deklinacioj en la lingvoj kie ili ekzistas. En Esperanto ekzistas nur la akuzativa fleksita formo per la aldono de la litero **-n**, kaj por la aliaj eblaj komplementoj aŭ kazoj, prepozicioj estas uzataj.

Anstataŭ. montras ion, kies rolon plenumas io alia, aŭ ion, en kies loko estas io alia. Anstataŭ havas do iaspecan nean valoron. Ekzemple: Anstataŭ vortaro mi ricevis libreton. Anstataŭ spertulo venis komencanto. Anstataŭ Esperanto li parolis francan lingvon. Anstataŭ kafo kelnero servis teon. Anstataŭ matene li eklaboris tagmeze. Ŝi parolis kun mi anstataŭ paroli kun mia frato. Ili vojaĝis al Oporto anstataŭ Lisbono. Ŝi naskis al li filinon anstataŭ filo.

Rimarko 1: Post prepozicio anstataŭ oni povas uzi infinitivan konstruon: Anstataŭ kanti ŝi krias. Anstataŭ ĝoji ŝi grumbas. Anstataŭ gajni iom da mono li perdis ĉion. Anstataŭ plendi vi silentu.

Rimarko 2: La prepozicio anstataŭ povas aperi antaŭ -ke aŭ -tio. Anstataŭ ke ĉiu lernas diversajn lingvojn, ĉiuj ellernadu unu saman lingvon (Zamenhof). Anstataŭ tio ke ni vane atendas, pli bone estus labori.

Rimarko 3: Zamenhof uzis foje pro kun la signifo de anstataŭ: Elporti la malnovan grenon pro la nova.

Rimarko 4: Ni neniam konfuzu la verbojn anstataŭi kaj anstataŭigi. Ambaŭ estas transitivaj aŭ objektaj verboj, tamen tio kio anstataŭas, mem

servas anstataŭ io. Sed male metas ion ajn anstataŭ, tio kio anstataŭigas.

Rimarko 5: La prepozicio anstataŭ, verŝajne pro sia longeco, nur funkcias prefikse kaj ne fine de kunmetitaj vortoj:

-**Anstataŭa** (tia ke ĝi anstataŭas aŭ povas anstataŭi): Vi fermu pordon per anstataŭa ŝlosilo. Ĉiuj aŭtoj havas kvinan anstataŭan radon.

-**Anstataŭe** (anstataŭ tio): Mi ne havis kafon. Anstataŭe mi prenis teon.

-**Anstataŭi** (esti, servi, roli anstataŭ io): Nenio povas anstataŭi la sanon.

-**Anstataŭigi** (meti ion anstataŭ io alia) Li anstataŭigis kelneron per kelnerino.

-**Anstataŭiĝi** : *Deklinacioj plene anstataŭiĝas per la prepozicioj* (frazo laŭ Ludoviko Zamenhof).

-**Anstataŭigebla**: Ĉiu laboristo estas...

-**Anstataŭanto**: Li turnis sin al mia anstataŭanto (*anstataŭisto, anstataŭulo*).

-**Anstataŭilo**: Produkto kiun oni povas uzi anstataŭ iu alia (*surogato, erzaco*).

Antaŭ. montras pozicion ĉe la flanko kiu estas plej proksima al la parolanto aŭ kiu estas la plej grava aŭ la ĉefa. La antaŭa flanko de homo aŭ de besto estas la flanko de la vizaĝo kaj okuloj. La ekzata senco de antaŭ dependas de la perspektivo de la parolanto. Ekzemple: Antaŭ la domo staras arbo. Tio estas ĉe la antaŭa flanko de la domo. Vespere antaŭ la pordego haltis konata aŭtomobilo, en kiu venis la gefiloj. Mi tuj invitis ilin en nian malnovan domon kaj mia edzino metis antaŭ ili bongustajn fruktojn kaj trinkaĵojn. La gastoj ne sentis timon antaŭ ni. Antaŭ povas montri eĉ estontecon kiu kvazaŭ staras antaŭ iu. Ili havas ja antaŭ si longan vojaĝon. Antaŭ povas montri pozicion pli altan en graveco aŭ rango. Esperanto estas antaŭ ĉio ekstraordinare facila lingvo. La pliboneco de Esperanto antaŭ

Volapük estas tiel frapante granda, ke ĝi falas al ĉiuj en la okulojn tuj de la unua rigardo. Mi neniam preferus riĉulon antaŭ malriĉulo. Ŝi petis min veni antaŭ la vesperiĝo, tio estas pli frue ol la vesperiĝo. Antaŭ tri tagoj mi revenis hejmen el Portugalujo. La pastro mortinta antaŭ nelonge, tio estas antaŭ nelonga tempo, estis de nia urbo. Antaŭ la lango laboru la cerbo. Ni memoru ke en diversaj esprimoj de horo estas uzata tempo antaŭ. Ekzemple, estas kvarono antaŭ la sesa. Nia kunveno finiĝis antaŭ la oka. Mia horloĝo jam montras kvaronon antaŭ la naŭa. Li forveturis hejmen kun sia amikino antaŭ du horoj. Antaŭ lia alveno, aŭ antaŭ ol li alvenis, ni manĝis kaj trinkis. Ne ĉiu homo ŝatas paroli antaŭ vasta publiko.

Malantaŭ: montras pozicion ĉe la mala flanko kompare kun la antaŭa flanko. Tuj malantaŭ si, aŭ tuj ĉe sia dorsa flanko, ŝi aŭdis viran voĉon. Malantaŭ la pordo oni aŭdis voĉon. Ni lasu la malfeliĉon malantaŭ ni. La luno iris malantaŭ la nuboj. Mia hundo leviĝas supren sur la malantaŭaj piedoj. Ni devas memori ke malantaŭ neniam havas tempan signifon (male al antaŭ).

(Mal)antaŭe kaj (mal)antaŭa: oni povas ankaŭ aldoni -e aŭ -a al la vorto (mal)antaŭ por krei adverbon aŭ adjektivon. Antaŭe estas en pozicio antaŭ io aŭ pli frue. Malantaŭe estas en loko malantaŭ io. Ekzemple: Antaŭe iris kantistoj kaj muzikistoj. La vizaĝo de la homo estas direktita antaŭen. Li estis lasta en la vico kaj restis malantaŭe. Li falis malantaŭen. La ĉevalo levis siajn antaŭajn kruojn. Ni reiris sur nian antaŭan lokon ĉe la marbordo. Mia hundo leviĝas supren sur la malantaŭaj piedoj.

Apud: montras proksiman pozicion flanke de ion. Plej ofte temas pri

dekstra aŭ maldekstra flanko, ne antaŭa aŭ malantaŭa, sed foje temas ĝenerale pri ia flanko. Tiam apud montras simple proksimecon. Ekzemple: Olga rigardis irantan virinon apud si (irantan dekstre aŭ maldekstre proksime apud si). Li staris unu horon apud pordo. La gefianĉoj staris longtempe apud la altaro. Patrino starigis florpoton apud ŝranko. Maljunulo sidas apud tablo kaj dormetas.

Ĉirkaŭ: montras pozicion ĉiuflanke de io (sed tamen tute ne devas esti rondforma pozicio). Ofte ĉirkaŭ montras nur pli-malpli enferma pozicio. Ekzemple: Homoj sidas ĉirkaŭ la fajro (ĉiuflanke de la fajro). Ŝiaj longaj belaj haroj ondiĝadis ĉirkaŭ la ŝultroj. Vinberbranĉoj kreskis ĉirkaŭ altaj kolonoj. Ŝi havis rideton ĉirkaŭ la buŝo (la rideto estis en tiu parto de la vizaĝo). Fernando Magelano vojaĝis ĉirkaŭ la mondon. La tero rondiras ĉirkaŭ la suno (tero ĉirkaŭiras, rondiras, la sunon). Liaj pentraĵoj kolektas ĉirkaŭ si amason de admirantoj. Ŝi metis siajn brakojn ĉirkaŭ mia kolo. Li kaptis la knabeton ĉirkaŭ la korpo. La ventego finiĝis ĉirkaŭ la mateno. Ĉirkaŭ vespero venas dormemo. Diabloj vagadas eĉ ĉirkaŭ sanktuloj.

Ekster: montras pozicion malene aŭ malinterne de io, ĉe la ekstera flanko de io. Ekzemple: Mi staras ekster la domo (malene, malinterne de la domo). Li loĝas ekster la urbo. Mia amiko atendas ekster la pordo. Ne zorgu pri tio kio estas ekster via scio (pri kio vi nenion scias). Multaj homoj diligente laboras ankaŭ ekster la oficialaj laborhoroj. Soldato sukcesis deĵori ekster la danĝera batalkampoj. La eno de ĉi-tiu homo estas pli bona ol sia ekstero.

Czesław Baranowki, Bulteno: Pola Esperantisto



Kiel ege demandite de diversaj legantoj, inter aliaj kelkaj belgaj fervojistoj de BEFA, nia bulteno publikas novajn esperantajn ilustritajn vortarajn paĝojn kun desegnaĵoj.







DANIELE VITALI



Membro de EBG - Esperantista Brusela Grupo